

Joseph Döpjohann,
Mia infana lingvo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Kiel knabo paroladis
nur platdiĉe mi,
ĉar tiele instruinta
estis panjo min.

Inter la infanoj urbaj
sidis sole mi,
kiuj flue paroladis
la germanan ja.

Sed ne daŭris longan tempon,
ĝis komprenis mi,
ĝis mi povis legi tiun,
ankaŭ skribi ĝin.

Iris mi for el la dom'
kiel juna vir',
lernis fremdajn lingvojn mi
en la vasta mond'.

Nun volonte pensas mi
kiel maljunul'
pri la infanec' kaj pri l'
lingvo de l' patrin'.

...

Tiam mi platdiĉan preĝon
diras por mi mem,
memorante jenan tempon,
kaj ekploras mi.

*Traduko de la Basgermana poemo "Miene Kinnerspraake" de JOSEPH DÜPJOHANN (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, *1930-10-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2003-04-16.*

MR-415-1 / Arg-251-509 (2004-07-04 22:05:37)

Kun afabla permeso de l' aŭtoro, sinjoro Joseph Döpjohan (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio), prenita el la libro "Liäbensbeller" ("Vivobildoj"), kiu aperis en 1998 en la eldonejo E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde, F. R. Germanio.